Registered at G.P.O., Melbourne, for transmission by post as a newspaper.




(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:
BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).
Abono (por 10 numeroj):
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj—Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.
Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.
Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.
Unu numero: 4 pencoj. :: :: :: :: :: Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.
Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj monbiletoj igu S-ron Roy Rawson la pagato.

N-ro 151 (13th Year). MELBOURNE (AŬSTRALIO). 5 MAJO, 1933.

## ON BEING MOVED TO TEARS.

It was at one time the fashion among learned men, even when Esperanto had been working successfully for many years, to say that an "artificial" language was impossible. In the course of time, however, it filtered through to our readers of knowledge and information, that there **was** an "artificial" language in which, it appeared, people could understand one another. So the cry of impossibility was dropped; which shows how enlightened and broadminded our pundits are. They will not fly in the facts of facts; only, they will not take the trouble of ascertaining the facts before pontificating upon them.

The latest cry is that although Esperanto may be very useful for travel, commerce and similar pursuits, it can never express fine shades of meaning or have any pretensions to literary power. This point of view was expressed by Mr. Wickham Steed in his presidential address to the Modern Language Association (we quote from "The Times"):

> Some generous souls looked forward to the happy times when the nuisance of learning foreign languages would be overcome by the adoption of a universal tongue, such as Esperanto . . . The aspirations of these idealists moved him to tears. For ordinary purposes of travel, or the exchange of elementary ideas, an artificial language might have its uses, and these uses were doubtless not to be despised. Yet for the subtler purposes of the interchange of thought, the representation of the finer shades of meaning, the whole art of linguistic and literary intercourse, he doubted whether any artificial language could ever take the place of living media of expression.

There are two errors in this, one of which is excusable and one of which is not. The excusable error is the supposition that the advocates of the international language are so naive as to think that any language, good, bad or indifferent, could ever replace the existing national languages. Had they been such simpletons, Esperanto would not now hold its present strong position.

But is is excusable in a non-Esperantist to doubt whether the language can express shades of thought sufficiently well for literary purposes. Obviously one cannot tell without making some study of the language. What, on this head, is inexcusable is that a public man, such as Mr. Steed, an editor of "The Times" and the "Review of Reviews," should so lightly make a pronouncement on the subject, without trying to discover whether the facts fit his theory. If only he had spent two or three hours examining the grammar and structure of Esperanto, or even questioned an Esperantist for half an hour, he would have come to a very different conclusion. But apparently an ounce of theory is worth a ton of practice, and it does not matter whether one's premises are sound.

We regret that the ideals of the "generous souls" should induce such painful emotion in Mr. Steed; for our part, when we consider the curiously unscholarly attitude of some learned men, we have thoughts that "lie too deep for tears."

("International Language," London, Feb., 1930.)

## ADVERTISING DRIVE BY BRITISH ESPERANTO ASSOC.

Probably most of our members know that Cadbury Bros. Ltd. make wrapped bars of milk and plain chocolate which retail at one penny each. These packets contain attractive picture stamps, which are inserted by collectors in albums, provided free by the firm, in exchange for 12 wrappers from these penny bars. Early in February a new series of stamps will be issued, and the albums for this new series contain the following announcement at the head of the first page.

**Of Special Interest.**

> Esperanto is the International Language. There has been such a rapid growth in its popularity as a study, that we decided to increase the interest and value of this album by giving the names of the subjects illustrated in both English and Esperanto. You will find these names printed beneath the spaces reserved for the stamps.
>
> More and more people in all countries are coming to recognise the important contribution Esperanto would make to a general understanding between the peoples of the world.

We understand from Cadbury's that about **200,000** of these albums will be issued; and they will, of course, go all over the country. Further, we understand that in their advertisements announcing these new albums, Cadbury Bros. intend to make a feature of the addition of Esperanto. Our readers should themselves obtain these albums, and **afterwards** congratulate Cadbury Bros. on their initiative.

W. H. Smith & Son, Ltd., have

agreed to stock and display Esperanto textbooks in their shops (but not necessarily the bookstalls, at present).

Negotiations are still in progress in other directions, and we hope to announce further successes shortly.

The advertising campaign will start at the end of January, with large-space advertisements in Truth, John o' London's Weekly, World Radio, The Teacher's World, Pitman's Journal, The Church of England Newspaper, Wide World Magazine, Blackwood's Magazine, Red Tape, Headway, The Travel Log, and The Countryman. This list will be extended, and other insertions appear, as funds permit.

("British Esp-ist," Feb., 1933.)

---

### TURKMENISTAN.

**Lekcio de S-ino E. L. Osmond, London, antaŭ la Dimanĉa Rondo.**

Mi intencis paroli nur pri Turkmenistan, sed mi trovis, ke la informo tiel ofte pritušas la du aliajn respublikojn de la antaŭa Turkestan, ke mi devas ankaŭ paroli pri Uzbekistan kaj Tadjikistan. Kune ili ampleksas Germanujon, Grandan Britujon, Francujon kaj Hispanujon, kaj estas ĉefe terkultura lando.

En 1863, pro la civila milito en Usono, Rusujo ne povis ricevi sian kutiman provizon de kotono, do, ĝi interesiĝis pri Turkestan, kie kotono kreskis, sed ĉar la popolo rifuzis submetiĝi al Rusujo, dum 22 jaroj okazis daŭra militado kaj buĉado. Fine la indiĝenoj estis venkitaj, kaj iliaj lingvoj malpermesataj. Koloniistoj venis el Rusujo, kaj nur iliaj infanoj ricevis edukadon.

Post la Japan-Rusa milito en 1905-6 multaj Rusaj soldatoj estis senditaj al Turkestan, sed ili ribelis pro malbonaj vivkondiĉoj, kaj komenciĝis malpaco, kiu daŭris kaj kreskis ĝis 1916, kiam la kamplaboristoj rifuzis soldatiĝi en la granda milito kaj ribelis. Oni subpremis ilin, sed post la Februara Revolucio en 1917. urbanoj, fervojistoj, kaj Rusaj koloniistoj ankaŭ ribelis kaj batalis kontraŭ la Basmaci (banditoj) subtenataj de Blankrusuloj* kaj Anglujo. La kamplaboristoj ne multe interesiĝis; ili laboris longajn horojn por malmulte da mono, ne povis legi aŭ skribi kaj vivis mizere, tamen la ribeluloj komencis doni al ili landon, sed ne sufiĉe por vivi sen pagata laboro. La superaj pastroj k o n t r a ŭ i s la d i s d o n a d o n de lando, sed la malsuperaj pastroj subtenis la dividon. Aŭdante la disputojn inter la pastroj la kamparanoj rifuzis kredi ambaŭ, kaj malfidis tiun religion, kies pastroj trompis ilin. En Oktobro 1924 Turkmenistan kaj Uzbekistan iĝis sendependaj respublikoj, kaj aniĝis al U.S.S.R. Tadjikistan respublikiĝis en 1925, sed, pro malbona interna stato, ĝi aliĝis al Uzbekistan por helpo kaj instruado. Tamen, en Decembro, 1929, ĝi tiel progresis, ke ĝi ankaŭ aliĝis al U.S.S.R., estante la sepa respubliko en tiu unuiĝo. Kiam la sovjetoj dividis kampojn, brutaron, kaj terkulturilojn inter la kamparanoj ilia ĝojo estis grandega.

En 1928 nur 4½ el cent de la Turkmenoj povis legi kaj skribi; en Uzbekistan iom plu. Nuntempe 33 el cent sub la aĝo de 40 povas legi kaj skribi—post nur tri jaroj de edukado.

Ne nur estas lernejoj por infanoj sed ankaŭ por plenaĝuloj, vesperkursoj por laboristoj kaj somerlernejoj, ĉiuj senpage; oni eĉ ricevas stipendion, librojn kaj ilojn por studo se necese. La enkonduko de latina anstataŭ araba alfabeto multe faciligis la lernadon. Ĝi estas uzata en ĉiu lernejo, por libroj, por ĵurnaloj, reklamoj, kaj registaro. Aliaj gentoj, ekz. la Karakalpakoj kaj Kirgizoj, kiuj ĝis tiam ne havis alfabeton, ankaŭ entuziasme akceptis ĝin. Oni povas legi librojn en institutoj, kooperativaj bibliotekoj, kluboj kaj tetrinkejoj, kie junuloj aŭ virinoj ofte laŭtvoĉe legas al tiuj, kiuj ĝis nun ne kapablas. En urboj troviĝas bone ekipitaj "Domoj por kamparanoj," kie tiuj, kiuj vizitas la urbon por libertempo aŭ negoco povas ripozi.

Grava turkmena literaturo jam estas eldonita en la nacia lingvo. Oni starigis Instituton por turkmena kulturo, muziksciencon kun orkestroj kaj horaroj. Ili verkas dramojn por la nacia teatro. La unua dramo temis pri la kaptado de Kizil Armat per la ruĝa armeo, kaj ĝia aŭtoro estis turkmena laboristo. Oni starigis lernejojn por teatra studo, kie oni jam produktis dramojn. Ili ankaŭ studas pentro- kaj skulptarton.

Antaŭ la Revolucio la kino estis tute nekonata, nun en ĉiu urbo estas tia, kaj vojaĝantaj kinoj iras al la diversaj vilaĝoj. Kutime la filmoj temas pri la vivo kaj historio de la popolo, sed ili ankaŭ havas sciencajn kaj propagandajn filmojn. La ĉefa renkontloko en urbo kaj vilaĝo estas la tetrinkejoj, kiuj, senescepte, havas radiaparaton.

Estas amuze al ni, kiel ili uzas la publikan radiaparaton. Antaŭ la revolucio virinoj devis ĉiam porti dikan vualon el ĉevalharo eĉ en la domo. Unue edzoj kaj fratoj batis kaj eĉ mortigis siajn virinojn, kiuj kuraĝis eliri senvuale. La registaro ne deziris batali kontraŭ tiu ĉi kutimo, sed ĝi decidis starigi silkfabrikejojn kaj ne permesi, ke vualitaj virinoj laboru en ili, pro la danĝero de vualo inter la maŝinaro. Pro tio laboristinoj formetis vualojn en la fabrikejoj, sed ili estis preskaŭ heroinoj se ili kuraĝis formeti ĝin surstrate aŭ hejme. Unu virino, kiu tion faris, estis kruele batita de sia edzo. Do, ŝi skribis al la urba sendstacio, plendante pri sia edzo kaj petante, ke oni dissendu tiun informon kun lia nomo kaj la nomo de la vilaĝo, por ke la najbaroj en la klubo aŭdu, kaj li hontos pro sia malprogresemo. Tion oni faris kun plena sukceso.

La ĉefa industrio de Turkmenistan estas kotonoplantado, sed ĝi estas malfacila pro manko de akvo; la registaro intencas akvumi ĝin per rivero Amu Darya. Sub la cara regimo, oni malpermesis fabrikadon, sed jam post nur 8 jaroj ili posedas kotonmuelejon, silkfabrikejojn, elektrejon kaj maŝinaron por produkto de oleo kaj salo. Per scienca esploro ili trovis subtere sulfatojn, kiuj provizos materialon por grava kemia industrio, karbon, feron kaj kupron.

Antaŭ 1929 multaj kamparanoj neniam vidis vagonaron. Kiam la unua alvenis, la mirigitaj homoj opiniis, ke ĝi estas dia kaj ili alportis girlandojn, fruktojn kaj viandon; ili simile faris, kiam ili vidis la unuan aeroplanon, kaj aŭtobuson. Tiuj kreis grandegan entuziasmon. Subite ili transiris de kamelo al aŭtobuso, vagonaro kaj aeroplano. En kelkaj vilaĝoj en la montoj ili eĉ ne konis radveturilon. Kiam oni komencis konstrui fervojon al Stalinabad, la traboj estis trenataj sur kameloj kaj ili perdis de ¾ ĝis metro de sia longo pro la dektaga frotado sur la malglata vojo inter Termes kaj Stalinabad (250 kilometroj).

Aeroplanoj en Eŭropo eble duonigas la vojagdaŭron, sed en Mezazio ili ofte dekonigas gin. Ekzemple, de Tashkent ĝis Kabul oni bezonas 3 semajnojn por iri sur ĉevalo inter montoj, kie banditoj vagadas, nun oni povas flugi sendanĝere en 2 tagoj.

Per radio oni ricevas novaĵojn, kiuj antaŭe bezonis semajnojn por alveni per ĵurnaloj. Ankaŭ ili nun scias la precizan horon per ĝi, ĉar antaŭe horloĝoj, kiuj bone funkciis, estis maloftaj en vilaĝoj. Kiam vilaĝanoj deziras informon pri iu temo, ili sendas petojn al la ĉefstacio, Ashabad en Turkmenistan. Samarkand en Uzbekistan aŭ Stalinabad en Tadjikistan.

Lenin diris, ke ŝtato ne povas progresi se ĝiaj virinoj estas subigitaj. En la cara regimo, virino estis samranga kiel bovo. Ŝi devis labori por sia mastro kaj naski infanojn. Oni vendis kaj aĉetis ŝin kiel marĉandaĵon. Antaŭ edziniĝo ŝi apartenis al la patro, poste al la edzo, kaj ŝi havis absolute neniajn rajtojn. Post starigo de sovjeta respubliko, viroj kaj virinoj egaliĝis ĉiurilate, kun samaj rajtoj kaj devoj. Ŝi povas partopreni la politikan kaj ekonomian vivon de la stato, sed tiu ŝanĝo, sufiĉe facila en Rusujo, estis treege malfacila en Mezazio. Nur per eduko povas la afero alĝustiĝi.

Sendube la popoloj aprobas la novan reĝimon.

Turkmenoj, Uzbekoj. kaj Tadjikoj kune batalis flankon ĉe flanko kun rusaj laboristoj kaj kamparanoj. Eble ili ne tute komprenas la signifon de komunismo, sed la nova reĝimo signifas por ili liberecon de virinoj, rajtojn de organizo por kamparaj kaj vilaĝaj laboristoj, forigon de la pastra tiraneco. Efektive, kiam oni legas kiel mirinde ili progresis dum la 8 jaroj de sendependa vivo, oni pensas pri la biblia frazo: "Popolo, kiu iris en mallumo, ekvidis grandan lumon; super homoj sidantaj en lando de morta ombro ekbrilis lumo."

(De informo provizita de Turkmena korespondanto.)

*Blankrusuloj, t.e., Kontraŭbolŝevikaj fuĝintoj ed Rusujo (Red.).

## RECENZ(ET)OJ.

**PARNASA GVIDLIBRO,** Kiel fariĝi poeto: de K. Kalocsay kaj G. Waringhien; eld. de "Literatura Mondo," Budapest; pĝ. 175, bindita unu dolaro, nebind. 0.70., plus 10 p.c. afranko.

La verko enhavas:—

1. Rimarkinda antaŭparolo de Waringhien plendanta pliigi le Esp. radikprovizon.
2. Fundamentaj konoj pri la versarto, de **Waringhien.** La plej pozitiva parto de la libro.
3. La Arto Poetika. Versoj brilante spritaj, en kiujn Kalocsay enspiras sian kredon pri la Esp. poezio.
4. Esperanta Rimaro; ĉiuj radikoj de la Plena Vortaro rime aranĝitaj kaj ankoraŭ 500 novaj.
5. Poezia Fakvortaro. En kiu tiu 500 ricevas difinojn.

En la historio de Esperanto Waringhien kaj Kalocsay reliefiĝos kiel interpretantoj de skolo akcentanta dezirindecon pliriĉigi kaj plielastigi la lingvon cele ke ĝi estu ĉiam pli kaj pli taŭga por servi al la beleco kaj subtileco de la poeta penso. Kalocsay, se ne ankaŭ Waringhien, estas influata de tiu antaumilita giganto Anton Grabowski, kies nomo, flankadire, elstaris en la reformdiskutoj de la frua tempo. Lia ĉefverko, "Sinjoro Tadeo," laŭ la vortoj de Kalocsay "ĝerme enhavas eble ĉion, kion oni povas elsorĉi el la lingvo." Per plikreskigado de tiuj "ĝermoj" ĉi tiu skolo volas pli intense akceli la evoluon de Esp-o laŭ linioj opiniataj de ĝi nepre necesaj por poezia esprimado.

K. kaj W. kaj iliaj kunpensantoj, ekzemple, asertas ke al la "mal"-vortoj mankas "elvokiveco," tio estas, la povo tuj ekestigi en la menso la konforman imagobildon. Laŭ W. la linio de Grabowski: "La tago malvarma, malgaja, sensuna," donas impreson pli de sunplena somertago ol la mala. Kaj K. rimfaras:

Eĉ, estas mia sento malgraŭvola
Ke la "malmola" molas pli ol "mola."

Nu, laŭ la teorio tio devus esti vera, sed pro konstanta uzado kaj do pensasociado milmiloj da adeptoj ne povas samopinii. Sur ĉi tiu demando Privat, en sia "Esprimo de la Sentoj en Esperanto," okupas kontraŭan pozicion. Permesinde estas kredi ke lia prezento de la argumentaĵo estas vaste favorata. Ĉu vere ekzistas absoluta malmoleco de vortsono? Ĉu ne povas vorto tielnomate malmola por anglo aŭ hispano ofte soni mola por ruso aŭ turko? Por itala orelo la germana lingvo estas tre gorĝsona, hake gutturala. Ĉu ni ne rajtas penseti ke troveblas popoloj por kies oreloj ĝi relative sonus dolĉa kiel ĉirpado de birdoj? Ni sugestas ke K. kaj W. estas supermezure obsedataj de eŭropaj lingvoj; ne unu linio en ilia verkaĵo pritraktas aŭ agnoskas la pretendojn de azilingvanoj, ĉe kiuj Esp-o laŭraporte konstante pligraviĝas.

La demando, almenaŭ por laiko, estas nemulte komprenata, kaj tre komplika, eĉ se oni sin limigas nur je la ĉefaj eŭropaj idiomoj. Sed ankaŭ orientlingvaj esperantologoj devus paroli en ĉi tiu diskuto; ilia partopreno kredeble kaŭzus modifojn de certaj teorioj de niaj du Mentoroj, aŭ elpenson de novaj.

Ne estas eble al ni iomlonge kritiki pli ol unu flankon de ĉi tiu ekstreme interesa libro, kiu, laŭ la opinio de kelkaj studantaj la evoluon de nia lingvo, povas grave influi sur la direktiĝadon de Esp-o. Per ĝi du sinceraj kaj kleraj laborantoj donas al ni verkon en kiu kvazaŭ kristaliĝis tendenco jam longe ekzercanta la pensadon de multaj kapoj en la movado. Ĝia formala prezento inter la kovriloj de la recenzato sendube helpos almenaŭ al pli klara kompreno de la demando, se ne al plena konsento al la donitaj gvidlinioj.

Pri la Poezia Fakvortaro nur direble estas ke multaj el la proponitaj vortoj estas strange elektitaj kaj malkontentige difinitaj. (Morbida, kun signifo de la itala "morbidezza"); baĉeloro, en senco de "junulo"). Mi ne scias kia mensa aberacio atakis tiun, kiu pensis dece enmeti en "poezian" vortliston terminojn pli kompreneblajn sur la lipoj de bordelano. (Robo.)

---

**Pangca, la sole ebla eliro el la mondkrizo.**—23-paga tezeto de Rudolf Herceg, eld. Heroldo de Esp-o. Prezo 0.30 ormarko. Trakto de unu el la plej gravaj demandoj de la moderna mondo—la malharmonio inter la produktado kaj la konsumado. Ĉiu sentanta intereson pri la ekonomia diskutado nepre havigu al si ĉi tiun pensinstigan kontribuaĵon al la solvo de enigmo, kiu tordas la cerbojn eĉ de la plej kompetentaj en ilia fako.

---

## KRONIKO.

**Wellington, Nov-Zelando.**—Post propagando per reklamoj tagĵurnalaj la ĉambro de la loka klubo estis preskaŭ komplena je la 7a de Februaro por la komenca vespero de 1933. Prezidis s-ro Bertram Potts, F.B.E.A., antaŭ almenaŭ 40 personoj. S-ro Potts bonvenigis novulojn kaj klarigis la laborplanon de la klubo. La klubdeleĝitino al la 4a N.Z. Kongreso, f-ino C. Smythson, raportis pri kongresagado, kaj post informoj kaj elmontro de transmara korespondaĵo la spertuloj gvidis klasojn organizitajn el la komenculoj, kelkaj el kiuj poste klubaniĝis. Same kiel en la pasinta jaro, la klubo kunvenos ĉiumarde, kaj provizos horon da instruo kaj horon da Esperanto-programo (paroloj, deklamoj, komedioj, k.s.). La dua kunveno de la jaro, je la 14a sammonate, estis ankaŭ sukcesplena; kelkaj membriĝis. Kredeble forta bazo fondiĝas por la 5a N.Z. kongreso je la jarfino! Je la tria kunveno, s-ro H. F. Franks, Mastertona Klubsekretario, kaj s-ino Stidolph, nin favoris per vizito.

**Masterton, N.Z.—Ĉiujara kunveno** kluba okazis la 15an de Februaro. S-ro A. Dewar, D.B.E.A., prezidis antaŭ bela nombro de membroj. Oni enoficigis la jenajn: Honora Prezidanto, s-ro G. R. Sykes, M.P.; Prez., s-ro A. Dewar, D.B.E.A.; Vic-prez., s-ro A. D. Sheppard kaj J. B. Johns; Hon Sekr., Kasisto, kaj Del. al NZEA., s-ro H. F. Franks, D.B.E.A.; Ĉefinstruisto, s-ro A. Dewar; Klasestroj, s-ino McNab, f-ino Ibbetson, s-roj A. H. M. Dewar kaj H. F. Franks; Ĝenerala Agkomitato, s-roj A. Dewar, L. Rutherford, kaj H. F. Franks. La ĉiujara raporto kaj bilanco estis akceptitaj. Kvin novaj membroj estis proponitaj. La duan kunvenon de la jaro ĉeestis 24 personoj. Freŝdate eldonita broŝuro-informilo de lokaj stratoj, civitaj organizoj, institucioj kaj societoj, k.s., provizas detalojn ankaŭ pri la Esperanto-Klubo.

---

At the annual general meeting of the Y.M.C.A., Masterton, the board of directors accepted with pleasure the honor of being patrons to the Masterton Esperanto Club. Since the club's inception the directorate has granted to it use of the social room and accessories **gratis.**

---

**Coburg Esperanto Club, Melburno.**—En perfekta vetero la klubanoj ekskursis ĉe The Lake. Invitiloj senditaj al ĉiuj aliaj kluboj alvenigis bone reprezentecan anaron de iliaj membroj. Vespere la piknikanoj ĝuis plezuran tempon ĉe la domo de s-ino E. S. Hanks. S-roj C. Saaren kaj Belmont per koncerta citro kaj violono ludis la dancmuzikon. Ankaŭ estis kuna kantado kaj porĉambraj ludoj. Helpe al komencantoj, kartetoj estis fiksitaj al ĉiu objekto en la ĉambro, inkluzive la manĝilojn kaj manĝaĵojn. La 13 aprilo la sek-io prezentis la duonjaran raporton, kiu atestis kontentigan daŭrigadon de klublaboro. Ĉeestis 33 anoj. Estis decidite okazigi festvesperon en la domo de s-ro E. Williams, en Anketellstr. la 10 majo, kun celo pliigi la klubkason por propagando plua. Unuanime membroj decidis formi branĉon de la Aŭstralia Labora Esperanto-Asocio el individuaj membroj, interne de la klubo, prefere ol kolektive filiiĝi al ĝi.

---

## PUBLIC MEETING ON ESPERANTO.

On Wednesday, April 5, a public meeting and concert was held at the Australian Church Hall. The speakers were Mr. Gilbert Wallace, of the Victorian Education Dept., and the editor of Educational Publications, who explained the structure of Esperanto. Mr. Rawson dealt with Esperanto and Practical Use, and Mr. Drummond sketched the life of the founder of Esperanto and the origin of the language. A short address in Esperanto by Mdme. Ninedek, a Polish lady unable to speak English, was rendered into this language by Mr. L. Thomson, then a play, given both in Esperanto and in English, brought to a conclusion a well-attended gathering.

# EL HINDA PLUMO.

## KIO ESTAS SAĜO?

**Rakonto el la hinda folkloro, de Lakshmiswar Sinha. Vidu La S.K., Junio, 1930.**

Li estis fama profesoro en filozofio. Li loĝis en antaŭurbo de la granda kaj antikva urbo Pataliputra, kies moderna nomo estas Patna. Li vivis trankvile en sia domo kaj estis tre okupata per verkado de filozofia libro kaj sia laboro. Ĉiuj rigardis lin kiel tre saĝan homon. Ofte li veturis en la urbon por fari paroladon pri sia filozofio.

Dum tiu tempo ne ekzistis fer- aŭ tramvojoj. La homoj uzis plej multe siajn piedojn, ankaŭ oni tre ofte veturis per boato, se estis rivero proksime. La fama rivero Gango pasas tra la urbo Patna. La hejmo de la profesoro estis sur la alia flanko de Gango sufiĉe malproksime de la urbo. Li havis unu malgrandan boaton kaj ankaŭ boatiston.

Unutage li foriris per sia boato en la urbo por fari prelegon. Kiam li finis sian prelegon, li iris rekte en sian boaton por vojaĝi hejmen. Estis posttagmeze. La boatisto ekpuŝis la boaton kaj remis hejmen. Subite la profesoro demandis al li: "Ho boatisto, ĉu vi konas ion pri filozofio?"

"Jes, sinjoro, mi aŭdis la vorton sed mi ne scias, kia objekto estas filozofio."

"Ah, tiaokaze unu kvarono de via vivo estas vana. Ĉu vi konas ion pri logiko?"

"Ne, sinjoro, sed mi scias, ke logiko estas nur por logikistoj."

"Ah, do unu duono de via vivo estas vana."

Nun li ree demandis al la boatisto: "Ĉu vi konas ion pri la astronomio?"

"Ne, sinjoro, tute ne."

"Oh, kiel malriĉa vi estas en la mondo. Tri kvaronoj de via vivo estas por nenio. Estas granda domaĝo."

La profesoro mediteme rigardis la ĉielon pensante pri la malriĉeco de tiu homo pri la manko de scio. "Vere tiuj homoj vivas en granda mallumo de la mondo," murmuris la profesoro por si mem.

La boatisto nur ĝemegis, sed ne parolis plu.

Por kelkaj minutoj la profesoro kaj la boatisto ambaŭ silentis. La boatisto remis la boaton kiel ordinare.

Subite la ĉielo mallumiĝis per dikaj nuboj. Ankaŭ forta ventego venis. Tondro ludis grandege en la ĉielo. La akvo de la rivero forte moviĝis. La ondoj jetiĝis sur la boaton. La profesoro timiĝis. La boatisto demandis al li: "Ĉu vi povas naĝi, sinjoro?"

La profesoro respondis timeme: "Ne, ne, boatisto—tute ne. Kion mi faru?"

La boatisto diris: "Tiam via tuta vivo eble estas tute vana. Kiel mi povus savi vin de tiu tre danĝera torento?"

"Ho, boatisto, kion mi faru nun?" kriis la profesoro pro timo.

Subite unu tre forta ondo surpasis la boaton kaj subprenis ĝin kun la profesoro en nekonatan lokon sub la granda rivero. La boatisto saltis el la boato kaj sukcesis savi sin.

Kiu scias? Kio estas saĝo?

# RADIO COLUMN.

Speakers are requested to send in, by 1st June at latest, particulars of any broadcasts arranged.

Esperanto lessons will be broadcast from 3LO at 7.45 p.m. on the dates mentioned below. An anecdote will be read at the end of each lesson to enable students to check their pronunciation.

**May 13th.**—Juĝisto: Ĉu vi opinias ke la akuzato estas mallaborema?

Atestanto: Mallaborema? Nu, mi ne dirus pri li, ke li estas mallaborema; sed, se estus necese, ke li laboru por digesti sian nutraĵon, li mortus pro malsato.

**May 27th.**—Knabeto: Panjo! ĉu la oreloj apartenas al la kolo aŭ al la vizaĝo?

Patrino: Kial vi demandas?

Knabeto: Ĉar vi ordonis al Mario, ke ŝi lavu mian vizaĝon, kaj ŝi lavis ankaŭ la orelojn.

**June 10th.**—Dormema kuracisto vizitis pacienton.

Li metis la kapon ĉe la brusto de sia paciento kaj diris, "Elparolu la numeralojn."

La paciento komencis: unu, du, tri, k.t.p.—

Kiam la kuracisto vekiĝis, li aŭdis: tricent dudek unu—tricent dudek du.

## POLISH STATIONS FAVOR ESPERANTO.

**The Feb. nr. of "Pola E-tisto" reports very satisfactory progress of Esperanto with the Polish radio stations. The February lecture of Prof. Bujwid was broadcast in Esperanto by all Polish stations except that in Katowice, which is now to be the subject of intense petition from those wishful of bringing Esperanto and Radio into reciprocal service. Prof. Bujwid at the recent Esperanto congress at Lublin cited the utterance of one station manager: "No lecture, in any other language, brought forth so strong an echo from all lands as those in Esperanto did." A letter of thanks to the station was received even from Australia!**

## JACK LONDON AND ESPERANTO.

"You can study French, or you can study German, or you can cut them both out and study Esperanto; you will get the culture tone just the same. You can study Greek or Latin, too, for the same purpose, although it will never be of any use to you. It will be culture though."

("Martin Eden.")

# ATENTU SINJORINOJ!

Estas nenio pli komika ol la insisto de la moderna virino pri egaleco kaj amikeco kun la viroj, kaj ŝia indigno pri ĝi, kiam oni proponas ĝin, anstataŭ la kavalireco.

(Wm. McFee en "La Havenestro.")

Estas beleco en kuranta ĉevalo, kaj beleco en fluanto rivereto; sed nenia beleco similas al la beleco de juna virino, kaj ŝi liberigante la hararon.

(Donn Byrne en "Messer Marco Polo.")

### Ĉu Ni Devas Forigi la Amon?

La tria internacia eŭgenika kongreso antaŭnelonge kunvenis en Novjorko.

La eŭgenikistoj kredas je scienca pariĝo. Sekve multaj homoj demandis ilin: Kion vi faros kun la amo? Ĉu vi celas forigi ĝin?

La respondo estis, ke homo edukita eŭgenike emas enamiĝi nur en eŭgenike bona persono, ĉar tia estus lia idealo. Do ne ŝajnas necese, de eŭgenika vidpunkto, forigi la amon.

### Ĉu Determino de Infansekso Estas Ebla?

D-ro Jacob Sanders el Rotterdam havas novan teorion pri determino de la sekso de naskotoj. Li studis tiun problemon ĉe homoj kaj faris eksperimentojn kun bestoj, kaj li trovis, ke la acideco de la sango de la patrino determinas la sekson de naskota infano. Se la acida procento en la sango estas alta, oni devas atendi knabinon; kaj inverse, se la sango estas pli alkala, verŝajne la naskoto estos knabo.

D-ro Sanders diras, ke la acideco postulata por naski inojn povas esti arte produktata per enkonduko en la korpon de lakta acido. En la sama maniero oni povas produkti alkalecon de la sango kaj naskigi knabon per enkonduko de malgranda kvanto da natria karbonato.

(El "Scienca Gazeto," Usono.)

[Prof-o W. Agar, melburna sciencisto, ĵus diris, ke, post multjara eksperimento - studo, biologoj povas definitive aserti, ke la sekso de la homo estas fiksita jam en la momento de koncevo (radiko en la Medicina Vortaro de d-ro Briquet), kaj ke nenio post tiu momento povas influi sur ĝian sekson. Ekzistas multaj teorioj pri seksdetermino, sed ili estas ĉiuj eraraj kun la escepto de la supre donita, kies vereco estas plenplene pruvita.]

### Malamikoj de la Cimoj.

Blatoj, skolopendroj, kaj ruĝaj formikoj estas nepacigeblaj malamikoj de cimoj, diras al ni Majoro E. E. Austen de la Brita Muzeo en Londono. Bedaŭre neniu el la tri insektoj estas ŝatata de homoj.

**Preseraro:** P. 46, kol. 3, linio 25. "barilojn" (legu: bariloj). P. 47, kol 1, linio 27, "Ĉtata" (legu: Ŝtata).

# SERIOZE KAJ SERCE.

Muzika festo okazis en kampara urbo. Junulino konkursis, kaj ŝia patrino demandis al ŝi, kiel si progresis. "Tre bone," diris la knabino, "sed la juĝanto ŝajnis tre pia viro." "Kial vi tiel pensas?" "Ĉar dum la tuta tempo, ke mi ludis, li tenis la manojn sur la okuloj, kaj diris "Ho, mia Dio, mia Dio!"

### FORTO DE KUTIMO.

Viandisto alkondukis sian fileton al kuracisto. Post zorga esploro ĉi tiu konsilas al li: "Volu uzi jen tiun kuracilon, kaj pesu lin ĉiusemajne du fojojn."

"Sed kiel pesi? Ĉu kun ostoj aŭ sen ostoj?"

### DISKUTETO.

Inter-renkontis en alia mondo estinta usona prezidinto Vilson kaj Moseo. Ekkonversaciis ili:

"Oni transdonis al mi," sarkasme diris Moseo, "sciigon, ke de ciaj 14 paragrafoj pri memstareco de la popoloj restas jam nur "kornetoj kaj piedetoj."

"Sed se ci atentus, kion homoj faris el ciaj dek Di-ordonoj!", respondis Vilson.

### MIRINDA TRINKAĴO.

Kio estas en cia botelo?

Tio estas tia trinkaĵo, ke post kies trinko homoj devas diri veron!

Ekglutinte iomete, la demandinto kun ekhaltinta spiro apenaŭ povis eldiri: Ja tio estas vinagro.

Ja ci tion vere diris,—seke respondis la kamarado.

### LAŬVOLA ELEKTO.

Ĉu cia paĉjo permesis al vi mem elekti edzon?

Jes.

Do, kiel vi sukcesis elekti tian fiegan viron?

Paĉjo diris:—Aŭ tiu, aŭ neniu—kaj jen mi tiun elektis.

Ho Panjo, diru, ĉu fruktaj'
Sur vojo kuŝas jam?
Silentu, kara, estas paĉj';
Mortiĝis li per tram!.

### Longdistanca Fotografado.

Per longfokusa lenso kaj infraruĝradia filtrilo britaj fotografistoj ĉe Dover sukcesis fotografi scenojn sur la franca marbordo nevideblajn al la fotografistoj. Elimino de infraruĝaj radioj kaŭzas, ke objekto je distanco de diversaj kilometroj ŝajnas esti tre proksima, kaj ebligas fotografadon de objektoj kiuj estas preter la videbleca distanco por homa okulo.

### TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following:—Mrs. Tondut, 4/6, June, '33; Mrs. Laws, 4/6, Jan., '34; Mr. P. Holmes, 2/6, Jan., '33; Mrs. Mumford, 6/-, Aug., '33; Miss Pope, 4/6, Feb., '34; Mr. Byatt (sales), 8/-; Brisbane Esperanto Society (sales) 12/-; Mr. C. Kidd, 10/-, Sept., '33; Mr. Hutton, 5/-, July, '34; Mr. N. G. Mills, 4/6, Aug., '33; Melbourne Esperanto Club (subs.), £1/5/-; Dr. F. J. Williams (adv.), 10/-; Coburg Esperanto Group (sales), 8/8; Mr. W. Gray (overseas sub.), Oct., '33; Mr. H. Franks, 5/-, Jan., '34; Mr. A. Dewar, 5/-, March, '34; Masterton Esperanto Club (adv.), 5/-, April, '33; Miss Pollock, 5/-, July, '33; Mr. Roberts, 5/-, Nov., '33; Mr. W. McPherson, 10/-, June, '35; Mr. Facer, 5/-, May, '34; Miss V. de Novak, 5/-; April, '34; Mr. F. A. W. Thomas, 4/6, Jan., '34.

### DU VOĈOJ.

"Por havi bonan stilon, nepre estas necese koni minimume tri diversajn lingvojn, al si malparencajn.. Kial ekzemple ni havis inter la slavoj tiom da bonaj stilistoj? Ĉar ili ĉiuj scias minimume tri lingvojn." (Kabe, en Literatura Mondo, Julio-Augusto, 1931, intervjuita de Jean Forge.)

"Mi, unulingvulo, ekamis Esperanton, uzis ĝin skribe kaj buŝe. Ĝi fariĝis mia dua lingvo, kiun mi parolas preskaŭ tiel bone kiel mian patran. Dum la lastaj 15 jaroj mi uzas ĝin ĉiutage parolante pri diversaj temoj en plej diversaj medioj aŭ legante verkojn eldonitajn en tiu ĉi lingvo." (Lingva Kritiko, Marto, 1933.) Tiel atestas Julio Baghy, hungaro, unu el la ĉefaj Esperantaj proz- kaj poezimajstroj, aŭtoro de "Viktimoj," eble la plej populara romano en nia lingvo, kaj kelkaj aliaj.

Multaj ne konsentas kun Kabe. Vere, scio de kelkaj lingvoj povas helpi leganton de nia literaturo kompreni fremdajn idiotismojn, kiujn enlasas en siajn skribojn niaj verkistoj—eĉ la poliglotaj. Sed Esperanto estas (almenaŭ principe) pura je naciaj idiotismoj, do rekta, logika pensesprimilo. Pro tio, ne estas necese, ke homo, celante fariĝi bona verkisto en nia lingvo, sciu nacilingvon krom la sia; sed li devas esti pacienca kulturanto de internacia stilo, kaj zorga evitanto de tiuj formoj karakterizaj nur por tiu aŭ tiu lingvo.

Atentinda estas ankaŭ tio, ke scio de kelkaj lingvoj povas eĉ pliintensigi la danĝeron uzadi idiotismojn, per tio ke ĝi larĝigas la kampon de eblaj eraroj; monogloto bezonas gardi nur kontraŭ tiuj de sia propra lingvo. Interese estus scii, kiuj el niaj bone konataj verkistoj estas homoj sciantaj nur la patran.

### LINGVA DISKUTEJO.

Pri p. 30, kol. 1 (S.K. 148) s-ro M. C. Butler skribas: "Ie en mia traduko de 'La Fundamentoj de la Kvakerismo' mi uzis la frazeron, 'la vojo suprena.' Sed mi ne pretendas esti—mi ne estas—unuaranga aŭtoro." Serĉinte la verkon mi ne trovis la cititan formon, sed trafis sur p. 11 "malproksimena"; kaj sur paĝoj 61 kaj 73 "la hejmena vojo." Ni tre dankas al nia helpema kaj modesta kolego. Rimarku "la ĉielenîĝa mirindaĵo de la Katedralo" sur p. 1 de Heroldo de Esp-o, 12 marto, 1933.

Al Pot. Se "ŝafbien(eg)o" ne kontentigas por traduki la aŭstralian "sheep station," eble prove uzinda estus "estancio." Evitenda estas "ŝafstacio," provincialismo.

La vorto "filo" por "phial" tute ne necesas. Uzu "boteleto." Jam tro da senutila balasto forme de neologismoj portas en si nia presita lingvo.

"Apologio" signifas ne "apology" en senco de simpla pardonpeto, sed "parola aŭ skriba defendo kaj pravigo de io aŭ, iu, solene farita."

"Farm'" estas verba radiko, kaj havas specialan signifon, lupreni lau kontrakto por difinita tempo. "Farmo" —farma prenado. Ne konfuzu kun "bien(ter)o.

### SIDNEO, SIDNEJO.

La ĵus eldonita "Taschenworterbuch" (poŝvortaro) de "Heroldo de Esp-o" donas "Sidneo" por "Sydney." Rhodes donas "Melburno" sed ne la ĉefurbon de Nov-Sud-Kimrujo. Fulcher and Long donas "Sidnejo." Laŭ nia nuna kono Zamenhof ne uzis la nomon en siaj skriboj.. Kion Aŭstralianoj opinias pri la demandeto?

### KORGRATULON

al s-ro A. C. Ward, Wimbledon, H.B., Nov-Zelando, pro lia sukceso kun honoro je la B.E.A. supera ekzameno—post mallonga konateco kun la movado, sed ŝajne post diligenta kaj konscienca studo.

### JAPANESE NATIONAL PARTY CHIEF FOR ESPERANTO.

On 4 Jan. the Tokio Central Radio Station JOAK broadcast a speech by Mr. Hidejiro Nagata, Mayor of Tokio, on the subject, "The Situation occupied by the Japanese People in the Field of International Relations." Japanese Esperantists were agreeably surprised to hear the Mayor energetically recommend Esperanto as the sole international language.

This action on the part of Mr. Nagata is specially striking owing to the facts that (1) He is not an Esperantist; (2) He is a leader of the Kenkokukai, a patriotic party having great influence with the Right wing in Japanese politics; (3) JOAK, the station that broadcast the speech, is unfavorable to Esperanto.

Further, Mr. Jukio Ozaki, an ex-minister and a statesman of note in Japan, now living in London, has written for the Jan. nr. of "Kaizo" (Reform), one of the most weighty socio-political gazettes, an article in which he deals with certain present-day problems affecting the Japanese, and strongly stresses the desirability of Japanese doing their best to forward the adoption of Esperanto.

### SPANISH MINISTRY OF EDUCATION AGAIN SUPPORTS ESPERANTO.

The Spanish Ministry of Public Education has again granted the Spanish Esperanto Assoc. a subvention of 5,000 pesetas for the teaching of Esperanto. The association has decided to open courses for teachers in Madrid and three other towns and to give eleven prizes. Each prize will consist of 400 pesetas and a free ticket to the Universal Esperanto Congress at Koln, in order that eleven teachers may visit this international gathering and there draw up a report on their experiences for official presentation to the Ministry on their return.

Senor J. Rosenorn is conducting a course of 30 teachers at the Athena de Madrid, an institution exercising much influence on the cultural life of Spain.

### ESPERANTO IN ITALY.

On 13 Sept., 1932, the Italian Ministry of Public Instruction informed the Italian Esperantist Federation that non-compulsory courses of Esperanto are always permitted in the schools of Italy.

(The three pars. translated from "Heroldo de Esperanto," Koln.)


## OOMOTO INTERNACIA

**aperas nun sur 32 grandformataj paĝoj. Konstantaj kolonoj pri Japanujo, Vojaĝoj, Literaturo, Filozofio. Senpartiaj, detalaj recenzoj, belaj ilustraĵoj!**

**Ne prokrastu sed petu tuj senpagan specimenon al la Eldonejo, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.**


## LI REVENAS TEREN.

"Mi," diris Hugo, "ne estas kontenta pri la fraŭlinoj ĉi tie troveblaj."

Tra arbaro de Cirrhòs promenis Hugo kaj Paŭlo, kaj iomete malantaŭ ili ankaŭ Henjo, la fratino de Paŭlo. Hugo ekrigardis la lentugan vizaĝon de Henjo.

"Ne," li diris al Paŭlo, "mi ne estas kontenta pri la fraŭlinoj ĉi tie troveblaj. Janette, mi bone scias, estas inteligenta, kaj tiu trajto ja estas malofta en iu ina; tamen ŝiaj kruroj tro similas la bastonojn per kiuj sorĉistinoj vizitas la strangajn spacojn de la aero."

Sovaĝete li svingis sian glavon, kaj, ĉar la arbobranĉoj estis malaltaj, frapetis lin multaj dolĉodoraj folioj, kiuj falas teren.

"Chlorinde," daŭrigis Hugo, "estas tre bela." Lia voĉo mallaŭtiĝis kaj li ridetis iomete. "Ŝiaj okuloj estas mistere profundaj, kiel la ombroj sub tiuj arboj; ŝia spiro svenige dolĉa, kiel somernoktaj ventetoj; kaj, kiel nigra nokto super odora ĝardeno, ŝia hararo vuale kaŝas la blankan brilon de ŝiaj ŝultroj. Tusi ŝian manon . . ."

"Mi vidis ŝin," diris Paŭlo, kaj eksopirĝemis

"Tamen," diris Hugo, "ŝi estas stulta, kaj mi ne povas toleri stultan virinon—almenaŭ frumatene. Vespere, kiam ronda luno lumetigas, stulteco ne gravas. Sed loĝado kun virino kiu ne povas dece estimi mian evidentan klerecon,—tiu ne logas min."

"Sendube vi pravas," murmuris Paŭlo.

Kiel oraj ŝnuretoj, la multaj sunradioj kune kuplis la herboriĉan grundon kaj la verdan foliaron de la dense kreskantaj arboj. Hugo kaj Paŭlo estis tre junaj—ili ankoraŭ ne lernis trinki el la amara pokalo de kompromiso. Ne estis eble al ili kredi, ke io povas esti neatingebla por junulo kun sufiĉe fervora deziro. Ili ankoraŭ ne sciis, kiel sensence forbrulas eĉ la plej altkora ardeco. En la mensoj de la junaj, ŝajnas ĉio esti ebla; en la koroj iliaj mensogkantas belvoĉa espero. Kia morto, la malrapida morto de l' eterna espero! Kia revo dolĉa dum ankoraŭ ĝi flame vivas!

"Do," diris Hugo, "mi vojaĝos tra la landoj de la mondo por trovi tiun virinon belan kiel la vintraj steloj, saĝan kiel la maljunaj saĝaj viroj de la montoj, kaj kies koro estas kompleza kaj homama."

. . . . . .

Ĉar Hugo estis aventura kaj multe sopiris tiun romanan perfektulinon pri kiu li multvorte multfoje parolis, li ja post iam forrajdis el Cirrhòs kaj grandioze vojaĝis en la landojn de la mondo. Tra Nenedek li vojaĝis, tra Renmar kaj Osirim al tiu lando kie loĝis Evane Iljane, kiu tiel dolĉe kantis, ke eĉ ŝi igis la najtingalojn flugi malsupren el la ĉieloj kaj sidi silente en la apudaj arboj. Evane Iljane, tamen, povis priparoli nenion escepte de la kantado.

Ankaŭ en tiu ĉi lando loĝis sorĉisto famkonata tra la tuta mondo. Al li iris Hugo kun taŭgaj donacoj.

"Maljunulo," diris Hugo, "mi serĉas virinon belan kiel la vivo, kaj saĝan kiel tiuj fratinoj, kiuj teksas niajn destinojn."

La sorĉisto rigardis Hugon strange, mokete. Li diris: "Mi konas tian virinon."

"Do," diris Hugo, "konduku min al ŝi."

"Tio ne estas tute facila," diris la sorĉisto, "Unue vi devas iĝi senmorta, ĉar tiu virino ankaŭ posedas senmortecon; due vi devas porti la rozkolorajn okulvitrojn de Jupitero, kiu nun estas morta kaj ne plu bezonas ilin; trie vi devas trapasi en la spegulon, kiun vi tie vidas," kaj li manmontris polvokovritan spegulon duonkaŝitan per araneaĵoj.

"Mi deziras tuj fari ĉi tiujn aferojn," diris Hugo.

"Do," diris la sorĉisto, kaj klarigis al Hugo tion, kion necesas fari por iĝi senmorta.

Ĉu tiu ja estas necesa?" hezite demandis Hugo.

Ĝi ja estas," respondis la sorĉisto.

Kaj Hugo faris tion, kio necesas.

Poste li iris al la spegulo, kiun ŝajne la sorĉisto rapide poluris dum Hugo surmetis la okulvitrojn.

"Antaŭ vi venos," diris la sorĉisto, "prenu ĉi tiun. Se vi iam dezirus iĝi denove mortala kaj reveni al via propra mondo, trinku tion, kion vi trovos en tiu boteleto."

En la spegulo povis Hugo vidi fabelc belan junulon, kiu pli kaj pli alproksimiĝis ĝis ŝajnis al Hugo kvazaŭ ili kolizius, kaj li tial haltis. Haltis ankaŭ la belulo.

"Bonan tagon," diris Hugo.

Sed la junulo nenion diris;—kvankam ŝajnis al Hugo, ke liaj lipoj movis. Denove Hugo paŝis al li elingigante sian glavon. Ankaŭ la alia svingis

glavon eĉ pli riĉe ornamitan ol la glavo de Hugo.

"Zorgu!" kriis Hugo, kaj svingis al la fremdulo la glavon. Li kuregis ale; sed tuj la bela junulo malaperis kaj Hugo staris sole en nekonata ĝardeno. En tiu ĉi ĝardeno staris ankaŭ virino pli bela ol iu, kiun Hugo iam imagis.

"Ĉu vi estas tiu Hugo," ŝi diris, "kiu serĉas virinon perfektan?"

Hugo respondis: "Jes."

"Mi do estas tia virino," ŝi diris, ridetante. "Venu kun mi."

Kaj Hugo iris kun ŝi.

La virino ja estis bela kaj inteligenta kaj afabla; kaj dum iam estis Hugo tre feliĉa. Ĉiam, kiam Hugo revenis hejmen de la rajdado, atendis lin Ojneh, kaj ĉiam ŝi estis bela kaj inteligenta kaj afabla.

Tamen post iam Hugo rimarkis en najbara ĝardeno belan blondan junulinon, kiu ŝajnis amikema.

"Bonan tagon," li diris ĝentile.

"Bonan tagon," ŝi respondis kun rideto.

Pli malfrue li diris al Ojneh: "Necesas, mia kara, ke mi vizitu la apudan urbon por intervjui homon pri hundo."

"O jes," respondis ŝi.

Sed tiun momenton la rozkoloraj okulvitroj falis de la nazo de Hugo kaj tute rompiĝis. Antaŭ li staris ulino, kiu strange similas al Henjo.

"Kiu vi estas?" demandis Hugo.

"Mi estas Ojneh," ŝi respondis, "sed ankaŭ mi estas Henjo."

"Tiu estas stranga afero," diris Hugo, kaj estis momente silenta.

"Nu," li diris, "se vi vere estas Henjo, estos pli bone, ke mi denove iĝos mortala."

Kaj li glutis la trinkaĵon, kiun donis al li la sorĉisto.

. . . . . . .

Estis krespuko en Cirrhòs. Antaŭ fajro sidis Hugo kaj lia bofrato, Paŭlo. Henjo kaj la infanoj enlitiĝis.

"Mi," diris Hugo, "ne estas kontenta pri la fraŭlinoj ĉi tie troveblaj."

"Nj havu trinkon," diris Paŭlo.

—"KINO."

# MALNOVAJ JARKOLEKTOJ DE "LA SUDA KRUCO"!

**Haveblaj estas tiuj de 1920 ĝis 1932, je kosto de du ŝilingoj por ĉiu. Turnu vin al nia adreso!**

## LA OAZO.

Malrapide kaj penege vojaĝis areto da viroj kaj kameloj inter la sablomontetoj de la dezerto. Jam du tagojn ili ne trinkis, kion atestis iliaj nigraj lipoj kaj ŝvelintaj langoj. Eĉ la kameloj, kutimaj je la dezerto, ŝajnis falontaj pro ellaceco kaj soifo. Renkontis la okulojn la sama senŝanĝa vidaĵo, sur kiun ili nun jam rigardis multajn tagojn —ĉie ŝtonoj kaj sablo, en amasoj kaj en ebenaj etendaĵoj: tie, ĉi tie maldelikataj arbustoj, pro senakveco malgrandaj kaj malfortaj: super la kapo kuprokolora ĉielo, el kiu senkompate brilis varmega aŭstralia suno, kaj sur kiu ne estis eĉ unu nubo por ĝojigi la dolorantajn okulojn de viroj kaj bestoj.

La estro, penege marŝante flanke de kamelo, fermis al si la okulojn, kaj aperis en la menso la loko, kie lastfoje li pasigis sian libertempon—blua maro, lazura ĉielo, verda herbo, densfoliaj arboj, belaj floroj, kaj ĉie dolĉa malvarmeto. Li pensis al la naĝado, al la mevoj rondflugantaj en la aero super maro kaj rokoj—ĉio nun neatingebla, kiel sonĝo. Sopirante li ree levis la kapon kaj rigardis per senbrilaj okuloj antaŭen.

Subite la sablomontetoj ŝajnis maldensiĝi, la dezerto pliebeniĝis. Malantaŭ li raŭke kriis viro, kaj postenrigardante li vidis du siajn kamaradojn helpantaj kompatindan mizerulon grimpi sur dorson de kamelo preskaŭ samtiel malforta. Ombrante per la mano sian vizaĝon li ekvidis en malproksimo ion verdan—kaj inter la verdaĵo ion, kio ekbrilis. Espero plenigis la koron de la estro, kaj tiam dubo. Ĉu estas plua vidiluzio? Kun pulsanta brusto li levis sian lornon kaj klare vidis——la oazon! Ili estis savitaj!

—A. TOWSEY.

## LA EDZINO DE LA BRUTARPELISTO.

(daŭrigata)

Ŝi ankaŭ baraktis kontraŭ la pleŭropneŭmonio, donis al la malmultaj restantaj brutoj medikamentojn, kaj ploris denove, kiam ŝiaj du plej valoraj bovinoj mortis.

Alifoje, ŝi batalis kontraŭ freneza bovo, kiu sieĝis la domon dum unu tago. Ŝi fabrikis kuglojn kaj pafis ilin tra fendetoj en la murplatoj per malnova pafilo. En la mateno ĝi estis morta. Ŝi senfeligis ĝin kaj ricevis sep ŝilingojn kaj ses pencojn por la felo.*

Ŝi ankaŭ batalas kontraŭ la korvoj kaj agloj, kiuj volas kapti ŝiajn kokidojn. Ŝia metodo estas tre originala. La infanoj krias "Korvoj, panjo!" kaj ŝi kuregas el la domo kaj direktas al la birdoj tenilon de balailo, kaj diras "Bang!" La korvoj rapidas for; ili estas ruzaj, sed la ruzeco de virino estas pli granda.

Foje, alkohole ekdrogita kamparulo, aŭ friponaspekta vagisto venas, kaj preskaŭ timigas ŝin ĝis morto. Ŝi kutime diras al la suspektinda nekonato, ke ŝia edzo kaj du filoj laboras apud la digo, aŭ ĉe la bovinkorto, ĉar li senescepte ruze demandas pri la estro. En la pasinta semajno vagisto, aspektante pendiginda, certiginte sin, ke ne estas viro sur la bieno, ĵetis sian pakaĵon sur la verandon kaj postulegis manĝaĵon. Ŝi donis ion al li; tiam li esprimis sian intencon resti dum la nokto. Estis tiam la sunsubira horo. Ŝi havigis al si bastonon, liberigis la hundon, kaj kontraŭ-staris la fremdulon, tenante la bastonon per unu mano kaj la kolumon de la hundo per la alia. "Foriru vi!", ŝi ordonis. Li rigardis ŝin, tiam la hundon, kaj diris—"Certe, sinjorino," en servema voĉo, kaj foriris. Ŝi aspektis esti decidema virino, kaj ankaŭ la flavaj okuloj de Aligatoro fikse kaj malafable rigardis ŝin, kaj la dentoj de Aligatoro tre similis al tiuj de sia samnomulo.

Ŝi havas malmultajn plezurojn por pripensi dum ŝi sidas tie ĉi, sola, por gardi kontraŭ serpento. Ĉiuj tagoj estas similaj por ŝi: sed dimanĉe posttagmeze ŝi kvazaŭ feste vestas sin, ordigas la infanojn, beligetas la infaneton, kaj faras promenadon tra la sovaĝejo. Ŝi faras la samon ĉiudimance. Ŝi prizorgas ĉi tiujn preparojn al si kaj la infanoj, ĝuste kvazaŭ ŝi farus promenadon sur pavimon de granda urbego. Tamen, estas nenio vidinda kaj neniu renkontebla. Oni povas promeni dudek mejlojn laŭ ĉi tiu vojo, kaj ne vidi iun ajn punkton rememoreblan por iu alia ol sperta kamparulo, pro tio, ke la scenejo prezentas senfinan, frenezigan samecon el duonkreskaj etarboj—tiun monotonon kiu igas homon volegi trafi la proksiman vagonaron kaj veturi for, ĝuste tiel foren kiel eble, kaj tiam forveli tiel malproksimen kiel ŝipoj povus naĝi—kaj eĉ pluen . . . . .

Sed tiu ĉi kampar-virino kutimiĝis al la soleco de la loko. Kiel juna edzino, ŝi malamegis ĝin, sed nun ŝi sentus sin strange for de ĝi. Ŝi ĝojas kiam la edzo revenas, sed ŝi ne ekscitiĝas pri tio. Ŝi pretigas por li bonajn manĝaĵojn, kaj ordigas la infanojn. Ŝi ŝajnas esti kontenta pri sia sorto. Ŝi amas siajn infanojn, sed ne havas la tempon ĝin elmontri. Ŝi ŝaj-

# POR LA KOMENCULOJ

**La Plej Grava Estaĵo en la Mondo.**

En hinduja vilaĝo loĝis tre bela knabino, kaj ŝiaj gepatroj, kiuj apartenis al la Musahar kasto, estis tiel fieraj, ke ili decidis, ke ŝi devos ne edziniĝi kun viro de sia propra kasto, sed ke edzo devos esti elektita el la plej altenaskitaj.

Post iom da diskutado ili konkludis, ke neniu pli alta ekzistis ol Ĉando la Sundio, do ili iris al li kaj diris: "O Ĉando, vi estas la plej alta kreaĵo en la mondo, kaj ni intencas doni al vi nian filinon kiel edzinon."

Ĉando respondis: "Mi estas certa, ke ekzistas iu pli alta ol mi."

"Kiu estas?" demandis la gepatroj.

"Nu, la Nubo estas pli alta ol mi, ĉar li povas kaŝi mian vizaĝon kaj min nuligi."

La gepatroj tuj forrapidis al la Nubo, kaj, kiam ili lin trovis, diris al li, ke ili venas por edzinigi sian filinon al li, ĉar li estas pli alta ol ĉiu ajn en la mondo.

"Ho ne," respondis la Nubo, "la Vento estas pli alta ol mi, ĉar li povas forblovi min post kelkaj minutoj."

La gepatroj tiam forrapidis al la Vento.

"Mi estas forta," diris la Vento, "sed la Monto estas pli alta ol mi, ĉar mi ne povas forblovi la Monton."

Tiam ili foriris al la Monto diris, "La Rato estas pli alta ol mi, ĉar li tuneligas en min, kaj mi ne povas rezisti lin."

Ili iris al la Rato respondis, "Estas vere, ke mi estas alta, sed ne tiel alta kiel la Musahar, ĉar la Musahar povas elkapti min el la rokoj kaj min mortigi."

Tiam la gepatroj hejmeniris kun sia filino, pripensante, ke ili finis kie ili komencis kaj ke, malgraŭ ĉio, estus pli bone ne fieriĝi, sed edzinigi sian filinon al unu el sia propra kasto.

**The Greatest Being in the World.**

In a Hindu village there was a very beautiful girl, and her parents, who belonged to the Musahar caste, were so proud that they decided she must not marry a man of her own caste, but that a husband must be chosen from among the very greatest.

After some discussion they came to the conclusion that no one greater than Chando the Sungod existed, and so they went off to him and said: "O Chando, you are the greatest being in the world, and we are going to give our daughter to you for a wife."

Chando replied: "I am sure there is someone greater than I."

"Who is it?" asked the parents.

"Why, the Cloud is greater than I, for he can hide my face and blot me out."

The father and mother thereupon hurried off to the Cloud, and when they found him told him that they had come to marry their daughter to him, for he was greater than anyone else in the world.

"Oh no," said the Cloud, "the Wind is greater than I, for he can blow me away in a few minutes."

The parents then hurried off to the Wind.

"I am strong," said the Wind, "but the Mountain is greater than I, for I cannot blow the Mountain away."

Then they hurried off to the Mountain, but the Mountain said, "The Rat is greater than I, for he burrows into me and I cannot resist him."

They went to the Rat, and the Rat replied, "It is true that I am great, but not so great as the Musahar, for the Musahar can take me out of the rocks and kill me."

Then the parents went home with their daughter, reflecting that they had ended up where they began, and that after all it would be best not to be proud, but to marry their daughter to one of their own caste.

**Melbourne Esperanto Club.**—Meets every Wednesday, 8 p.m., in Australian Church Hall, Russell Street, Melbourne. Tuition, classes, conversation, etc. Secretary, Mr. R. Rawson, 169 Exhibition Street, Melbourne.

**Westralian Esperanto Society,** Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikaĵojn al la sekretario.

**Masterton (N.Z.) Esperanto Club.**—Meets Tuesdays at 8 p.m. in Y.M.C.A. Patrons: The Y.M.C.A. board of directors; Hon. Pres., G. R. Sykes, Esq., M.P.; Pres., Mr. A. Dewar, D.B.E.A.; Secretary, Mr. H. Franks, D.B.E.A. Address: 38 Worksop-rd., Masterton. Visitors welcome.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo** (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro C. Brandon. Komunikaĵojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

**Wellington Esperanto Club.**—Meets every Tuesday. 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A.; Vice-President. Mr. V. Leck; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, sinjoro P. Hudson; sekretariino, f-ino L. Irwin, D.B.E.A.. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18½h.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, **"Manning Building," 449** Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro A. W. Peacock; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbana Esperanto-Societo** kunvenas **la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str:, proksime de konstruaĵo** "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Vicprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane.

**Coburg Esperanto-Grupo**—Kunvenas ĉiuĵaŭde je la 8a vespere ĉe la Labour Hall, Sheffield-st., Coburg (malantaŭ Grand Teatro). Prezidanto, s-ro E. Williams; sek., A. W. Spencer, 48 Munro-st., Coburg. Vizitantoj ĉiam bonvenigataj.

---

nas severa al ili. Ŝiaj ĉirkaŭaĵoj ne favoras la evoluon de la "virina" aŭ sentimenta aspekto de ŝia karaktero.

(Daŭrigota)

**NEXT NUMBER—JUNE 12.**

**Latest Date for "Copy"—June 1.**

**KVAKERISMO KAJ PACO.**

---

**Mi havas senpagajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj paco por disdoni. Ponvole petu per ilustrita poŝtkarto aŭ letero al:—D-ro Fred J. Williams, Samaria. PAPUA. (fratorganoj bv. represu.)**

**Wholly set up and printed in Australia by the Triumph Press. Surrey Hills, Victoria.**